# LIGILO

N-RO 15 - JUL/AŬG/SEP 1992

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**

Caixa Postal 3625, CEP 70084, Brasília (DF) Tel: 226-1298



## KARA LEGANTO,

Kvazaŭ speciala "Kongresa Kuriero", ni prezentas LIGILOn N-ro 15, kies ĉefaj celoj estas diskonigi ke Brazila Esperanto-Ligo havas novan Estraron kaj, samtempe, liveri resuman raporton al vi, kiu bedaŭrinde ne havis, pro iu ajn kaŭzo, la ŝancon partopreni en la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto, kaj disdividi kun la aliaj ĉeestantaj amikoj la ĝuon de tiel grandioza kaj bone organizita evento.

Espereble vi povos ĝui per la legado la diversajn bonajn novaĵojn rezulte de tiu tre fruktodona kongreso, kiel starigo de Fondaĵo Almada kaj la nova fazo en la rilatoj de Brazila Esperantista Junulara Organizo -- BEJO kaj BEL en la preparo de komuna ĉiu-jara kongreso ekde 1993.

Estas granda domaĝo ke vi ne venis al Anápolis, kie, kiel atendite kaj anoncite de la redaktoro, tiu tre kompetenta teamo sub la majstra gvidado de Dr. Sidney Assis Brasil preparis por ni, la brazila esperantistaro, neforgeseblan kaj belegan feston. Tio signifas evidente grandan respondecon por estontaj organizantoj de tiu serio de BKEj, kaj kreas ekde nun la anhelon konstati ĉu San-Paŭlo superos la urbon Anápolis, venontjare.

Elkoran dankon al la lokaj aŭtoritatoj kaj al tiuj, kiuj ielmaniere kontribuis por la sukceso de la evento, kun gratulo al la tuta skipo kiu konsistigis la Organizan Komitaton de la 28a BKE.

## LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO (BEL).

Aperas trimonate.
Redaktoro: Enivaldo Alves Silva

ESTRARO DE BEL

Prezidanto : Neia Lucia Souza
Vic-Prezidanto: Francisco M.de Oliveira
1-a Sekretario : Jose Carlos Dorini
2-a Sekretario : Wilson A. de Oliveira
3-a Sekretario : Licio de A. Castro
1-a Kasisto : Aymore Vaz Pinto
2-a Kasisto : Maria das Dores Goes

PERKORESPONDA KURSO: Carlos Maria

KONTROLKOMISIONO:
Altino Araujo Vasconcellos
Jose Romao Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

Anstatauantoj:
Adolpho de Miranda e Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

KOMITATANO "A": Symilde Schenk Ledon

## EĈ KONGRESA KURIERO

Periodaĵo kiu cirkulas dum kongresoj, ordinare en la universalaj, sed kiu furoris en Anápolis. Nia "Kongresa Kuriero" eldonita dum la 28-a BKE, aperis en kvar numeroj sub la respondeco de Giuseppe Gratapaglia kaj Enivaldo Alves.

# EL KONGRESA KURIERO

## N-ro 1

ABERTURA SOLENE -- Com grande brilhantismo teve lugar no Teatro Municipal de Anápolis a Abertura Solene do 28º Congresso Brasileiro de Esperanto, que contou com a presença e o prestígio das mais altas autoridades regionais, entre estas o Exmo.Sr. Prefeito da Cidade, o Dr. ANAPOLINO SILVERIO DE FARIA; o Dr. Marco Aurélio de Oliveira Santiago, representando o Sr. Cmt. da Base Aérea de Anápolis; o Sr. Francisco Ferreira Rosa, Diretor Executivo da Fundação Municipal de Esportes e Cultura; o Dr. Eurico Emídio Velasco, PATRONO do 28º CBE; e o Dr. Achiles Mendes Ribeiro, Presidente da Câmara de Vereadores. Após a abertura oficial dos trabalhos pelo Sr. Josias Ferreira Barboza, Vice-Presidente da Liga, que ali representava seu Presidente o Deputado José Lins Albuquerque, seguiram-se a execução do Hino Nacional pela Banda Municipal "Lira de Prata", o discurso de saudação e boas vindas do Sr. Prefeito; palavras do Dr. Sidney Assis Brasil, Presidente da Comissão Organizadora, destacando o importante papel do Esperanto como fator de proteção ás culturas minoritárias e suas linguas; saudação da Sra. Symilde Schenk Ledon, representando a Associação Universal de Esperanto; e, finalmente, o canto de "La Espero" acompanhado pela "Lira de Prata", que antecedeu o finíssimo coquetel com que foram brindados os presentes. A Abertura Solene foi, sem dúvida, magnífica e modelo pela sua organização e leveza.



EMBAIXADORA SAUDA O 28º CBE -- Entre as diversas mensagens de saudação ao Congresso, mereceu destaque aquela da Embaixadora da República Polonesa no Brasil, Sra. KATARZYNA SKORZYNSKA, lida por ocasião da Abertura Solene: "Agradeço o amável convite a mim enviado para o evento do 28º Congresso Brasileiro de Esperanto,... Devido a outros compromissos inadiáveis assumidos, lamento muito não poder participar da cerimônia oficial de abertura do Congresso... Aproveito esta oportunidade para manifestar minha mensagem de felicitações, com calorosos votos de muitos sucessos em todas as atividades da Liga Brasileira de Esperanto."

## - - - N-ro 2

RAPIDE ELĈERPIĜIS -- Eldonita en 400 ekzempleroj, la Kongresa Kuriero Nº1 furoris dum la unua tago de la kongreso kaj rapide elĉerpiĝis. Multaj kongresanoj maltrafis sian kopion kaj naskiĝis "nigra merkato" por la kolektantoj de tiu verda folio. Ne multaj gratuloj ricevitaj; malmultaj ankaŭ la kontribuaĵoj, kvankam la Kuriero estis je dispono de ĉiuj gekongresanoj por diskonigi interesajn ideojn, proponojn, klaĉojn, ktp.

ĈEMIZOJ JE PREZO DE BANANO -- Fanfaronis afiŝo en kongresa stando, laŭ konata slogano de la tempo feliĉa, kiam bananoj estis malmultekostaj. Sed kiam kongresanino el la intern-lando volis interŝanĝi 6 bananojn el sia bananejo, kontraŭ 6 ĉemizoj, montriĝis ke tiu reklamo estis trompa. La komercisto kulpis pri la manko de pluralo en la vorto "banano", kaj bedaŭrinde la "Kodo por Defendo de Konsumantoj" ne antaŭvidas tiajn kazojn. Tamen, ni konfesu ke la ĉemizoj, artisme faritaj, ĉiam tre bone impresas kaj altiras la atenton de ĉiuj preterpasantoj.

EL LA LUNDAJ PROGRAMEROJ -- D-ro. José Passini, Lia Moŝta Rektoro de Federacia Universitato Juiz de Fora (UFJF)prezentis detalan trarigardon de la multfaceta utiligo de Esperanto: fakaj asocioj, firmoj kiuj uzas Esperanton, Delegita Reto, ktp. Li akcentis ke la grandaj ideoj progresas malrapide kaj Esperanto alvenis por resti. Rekomendis, tamen, ke oni ne plu diru ke Esperanto estas la lingvo de la estonteco, sed simple asertu ke ĝi estas la Internacia Lingvo. Inter la klerigaj programeroj, kiel kutime, la CSEH-KURSO kaj KONVERSACIA RONDO altiris sufiĉe grandan nombron da kongresanoj.

ARTA VESPERO -- "Anápolis regalis nin per Arta Vespero vere digna de granda Kongreso". Tia estis la komentario de la kongresanoj, kiuj plenigis la Urban Teatron, lundon vespere. Ni bezonus multe pli da spaco por emfazi la artajn meritojn de ĉiuj ludantoj. Krom la talento de la ĥoro de la Posto de Goiânia, kaj la entuziasmiga prezentado de la Urba Muzikistaro "Arĝenta Liro", imponis la ĉe-estantojn la esperanta nivelo de "ESPERARTE" kaj "IMPROVIZO", la virtuozaj duoj gitaraj kaj harpo/gitaro. Entute ĉiuj estis mirindaj. Per amuza pantomino de Jorge Teles "Kaj Kelkaj Noktoj..." fariĝis noktomeze!

## N-ro 3

LA INFANOJ ĜUAS LA KONGRESON -- Laŭ la modelo de niaj Universalaj Kongresoj, ankaŭ la infanoj havas sian kongreseton. Sub la gvidado de bonvolaj kongresaninoj, dekvino da infanoj ludas, amuziĝas kaj ekskursas dum la gepatroj aktive partoprenas la kongresajn laborojn.

TIEL NI AKTIVAS -- La Esperanto-Asocio de São Paulo konstatis ke simpla bonvolo kaj ĉiama kunlabor-preteco NE SUFIĈAS en nia movado. Cetere dungo de profesiuloj ne eblas pro financaj kialoj kaj povus eĉ konduki al fiaskoj. Tial, la estraranoj de la Asocio alterne deĵoras en la sidejo. En São Paulo oni aparte zorgas la kvaliton de la geinstruistoj kaj tiucele ili ricevas konpenson por la kursoj. La Asocio precipe zorgas konversaciajn rondojn, legadon de esperantista gazetaro, libro-servon, ktp. ***** La Asocio Potigvara en Natal kunvenas ĉiusemajne kaj disvastigas la Internacian Lingvon per stratajn rubandoj, gazetaraj anoncoj, ktp. La nivelo de la instruado estu kiel eble plej alta kaj la praktikado okazas per monataj kulturaj kunvenoj, kunlaborado kun aliaj nord-orientaj asocioj. Entute oni devas esti kreivaj por progresi. ***** Por la Spirita Eldona Societo Lorenz Délio Pereira de Souza skizis la originojn de la Societo kiu naskiĝis kiel Libro-Klubo por spiritualismaj verkoj. Ĝis nun la Societo jam disdonis pli ol 20.000 librojn tra la tuta mondo. ***** En Florianópolis funkcias ne nur la Sankta Katarina Esperanto-Asocio, sed ankaŭ la urba asocio, kiu kunvenas ĉiusemajne. Krome aktivas grupo ĉe la Universitato (por strategie ĉeesti tiun gravan medion), kie oni kreis la Universitatan Rondon Esperantistan. Regulaj kursoj okazas ĉe spiritistoj kaj lastatempe la Fondaĵo SIMPOZIO konstruis du domojn kun la celo doni sidejon al la laboroj por la granda Filozofia Enciklopedio kaj krei fizikan bazon por la aranĝo de Someraj Festivaloj Internaciaj. ***** La Esperantista Asocio de Ceará estas nuntempe en reorganiza fazo kaj oni enkondukis la devon de ĉiuj estraranoj paroli Esperanton kaj aliĝi al BEL. La Asocio planas inviti en la estonteco Brazilan Kongreson de Esperanto, sed... ***** Raporteton oni aŭdis ankaŭ pri Asocio de Esperanto en Mato Grosso do Sul, kie la movado estas malgranda malgraŭ la okazigo tie de nacia kongreso en la jaro 1989. ***** Amazonia Esperanto-Asocio estis pasie prezentita de sia prezidanto Jayme Pereira, kiu amplekse pritraktis la multfacetan aktivecon en sia Ŝtato kaj en la tuta norda regiono. Aranĝo de dek kursoj jare, starigo de deko da lokaj societoj en Manaus, aliĝo al UEA de 60 fakdelegitoj estas nur kelkaj el la atingoj de tiu nia movado, kies motoro estas Jayme Pereira. Liaj vortoj estis skuaj -- eble tro skuaj por kelkaj el niaj burokrataj lacaj batalantoj.

GINCANA CULTURAL — Em 3 periodos foi realizada com sucesso a Gincana Cultural Esportiva sôbre a vida de Zamenhof. Compareceram aproximadamente 30 pessoas, das quais 11 responderam, marcando pontos. Os prêmios foram entregues sob aplausos dos participantes para os seguintes vencedores:

- 1º Prêmio: IGOR, Divinópolis, MG;
- 2º Prêmio: LADISLAU, Divinolândia, SP;
- 3º Prêmio: WALKIRIA, São Paulo, SP.

NIA VERDA SERENADO -- Ĉe la aviada klubo Mach II kunvenis la kongresanoj, ĉiuj junaj fizike aŭ spirite, por la tradicia kunfratiga kongresa balo. Verdire la anoncita "serenado en ne tro brua medio" ne plenumis sian promeson kaj en tio profitis ĉefe la gejunuloj, kiuj ne bezonas konversacii por amindumi. Kontraŭe, la eks-gejunuloj devis krii unu kun la alia por interkompreniĝi. Sed ĉiuj amuziĝis ĝis kiam fariĝis morgaŭ. Kompreneble, tiuj kiuj laste forlasis la klubon anticipe rezignis koni CEBRASA kaj la famajn MIRAGE III.

## - - -N-ro 4

VIZITOJ TRA LA URBO -- La bier-fabrikon CEBRASA rajtis viziti nur 50 homoj, pli ol 16 jaraj, bonkondutaj kaj loĝantaj ekster Anápolis. La feliĉuloj, kiuj plenumis ĉiujn kondiĉojn, ĝuis la akcepton ĉe la fabriko kie ili estis regalitaj per koktelo, gustumado de trinkaĵoj tie produktitaj kaj ricevis donace eĉ reklam-ĉapelon. Dum la posta inaŭguro de la monumento, oni tuj rimarkis la kongresanojn, kiuj vizitis CEBRASA, ĉar ili estis tiuj, kiuj plej laŭte parolis, aplaŭdis kaj entuziasme kantis la himnon kun iom tro brilantaj okuloj! ***** Kvin aŭtobusoj kondukis pli ol 200 gekongresanojn al la AERBAZO DE ANAPOLIS, kie ĝia komandanto akceptis nin kaj detale klarigis la strukturon, celojn kaj labor-agadon de tiu teknologie-moderna defenda bazo. Ni havis la eblecon observi de proksime la militan efikecon de jet-aviadilo MIRAĜO F 103, en la sekreta espero neniam praktike sperti ĝin. Speciale por nia vizito, 5 Miraĝoj elteriĝis kaj alteriĝis post kelkaj rapidegaj kaj malaltecaj superflugoj de la bazo. Tio estis aparte ekscita kaj ŝatata de la multenombraj ĉeestantaj infanoj.

## LA KONGRESA TRANSPORTADO PERFEKTE FUNKCIIS

Tion konstatis ĉiuj kongresanoj,
kiuj SENPAGE kaj akurate estis transportitaj
al kaj el la kongresaj aranĝoj!



SEMO LASITA EN ANAPOLIS -- "Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas..." sed la ferbetona semo, kiun ni ĵetis en la centron de Anápolis (Placo 31a de julio, vid-al-vide de la Urbestrara Ĉambro), malfacile perdiĝos. Verkita de loka plastik-artisto LOURES, la monumento reprezentas terglobon sur kiu staras verda stelo en kies pintoj du manoj interplektiĝas. Je la ĉeesto de kelkaj urbaj reprezentantoj, inkluzive de D-ro Achiles Mendes Ribeiro, Prezidanto de la Urba Konsilantaro, Prof-ro Evaldo Pauli oratoris emfazante niajn konatajn tezojn favore al Esperanto. Li aparte akcentis la absurdan situacion de la instruado de fremdaj lingvoj, kio, krom alte-kosta, estas praktike senefika kaj donas prestiĝon nur al t.n. lingva imperiismo de kalkaj nacioj. Ni ne estas kontraŭ la lernado libervola de fremdaj lingvoj, sed ni atentigas kontraŭ la danĝero de la altrudo de ilia instruado, kiu povos, iom post iom, malkarakterizi kaj detrui la naciajn kulturojn.

# FONDAĴO ALMADA

La efika partopreno de la Federacia Konsilantaro dum la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto fruktodonis. La prezidanto de tiu grava BEL-institucio, S-ro Evaldo Pauli proponis kaj la ĉeestantaj konsilantoj aprobis la kreon de fondaĵo por finance subteni Brazilan Esperanto-Ligon, rilate al specialaj projektoj. La unua projekto apogota de tiu fondaĵo estas la pligrandigo de la sidejo de BEL, pere de aĉeto de pliaj ĉambroj aŭ de tereno por estonta taŭga konstruaĵo. Laŭ sugesto de BEL-estrarano, José Carlos Dorini Ramos, ĝi nomiĝas "FONDAĴO ALMADA", omaĝe al nia karmemora S-ro Francisco de Souza Almada, kiu senlace ĝis sia forpaso laboris por Esperanto kaj kune kun aliaj batalantoj sukcesis havigi sidejon por la tiama Brazila Konsilantaro de Esperanto, kie nune funkcias BEL post la kunfandiĝo kun BKE en 1986. La lasta ero de la kongresa fermo estis ĝuste la sciigo pri la kreo de "Fondaĵo Almada" kaj ĝia celo. Tiam S-ro Evaldo Pauli anoncis la unuan donacon al da Fondaĵo, je la valoro de Cr$ 100.000,00 farita de li mem. La tuja reago de la ĉeestantaro estis miregal Preskaŭ samtempe multaj homoj direktis sin al la podio por ankaŭ prezenti sian donacon! Tre emocitita, la ĵus enpostenegita prezidanto de BEL, Néia Lucia Souza dankis ĉiujn kaj transdonis la ricevitan sumon al la nova kasisto de BEL, D-ro Aymoré Vaz Pinto. Ĝis la 29-a Kongreso en São Paulo, la fondaĵo estos ĵure organizita, kaj ĝi funkcios tute sendepende de BEL-estraro. Dume, la ricecevitaj kaj ricevotaj sumoj restos en apartigita banka konto, laŭ la plej favora rentosistemo. Oni ankaŭ decidis, ke la donacintoj aŭtomate iĝos kunfondantoj de la fondaĵo kaj simile oni konsideros tiujn, kiuj ĝis la Kongreso de São Paulo (julio/93) donacos minimuman kvanton samvalore al la donacoj faritaj en Anápolis, tio estas, ĉirkaŭ 26 usonaj dolaroj. Brazila Esperanto-Ligo elkore dankas la ĉi-subajn donacintojn:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Adolpho de Miranda Silva... | 100.000,00 | Adonis Marcelo S Silva... | 100.000,00 |
| Alberto Guedes Curopos..... | 100.000,00 | Altino A Vasconcellos-Gen | 100.000,00 |
| Aymoré Vaz Pinto........... | 100.000,00 | Carlos Maria............. | 100.000,00 |
| Cláudia Helena P Amêndola.. | 100.000,00 | Cláudio R S Spinelli..... | 100.000,00 |
| Evaldo Pauli............... | 100.000,00 | Francisca Martos......... | 100.000,00 |
| Francisco Mattos Oliveira.. | 100.000,00 | Geraldo Mattos........... | 100.000,00 |
| Gilbert Rene Ledon......... | 100.000,00 | Giuseppe Grattapaglia.... | 100.000,00 |
| Ivaldo Alves de Souza...... | 100.000,00 | Jair Salles.............. | 100.000,00 |
| José Carlos Dorini Ramos... | 100.000,00 | José Pauluk.............. | 100.000,00 |
| José Romão Filho-Comend.... | 100.000,00 | Manoel Borges dos Santos. | 100.000,00 |
| Néia Lúcia Souza........... | 100.000,00 | Neuza Caldas Figueiredo.. | 100.000,00 |
| Osvaldo P Holanda/M Delza.. | 100.000,00 | Roberto Vieira Resende... | 100.000,00 |
| Rosária (*)................ | 50.000,00 | Sérgio Neri da Mata...... | 100.000,00 |
| Sidney Assis Brasil........ | 100.000,00 | Sílvia Maria Bühler...... | 100.000,00 |
| Tobias Ferreira............ | 50.000,00 | Walkiria Vernacci L Rubio | 150.000,00 |
| Wilson Alvares de Oliveira. | 100.000,00 | Wilson Pereira Deslandes. | 100.000,00 |

(*) Bedaŭrinde ni ne sukcesis la tutan nomon de samideanino Rosária. Ni nur scias, ke ŝi loĝas en Rio de Janeiro. Bonvolu skribi al ni, kara Rosária!)

Krom la supraj nomoj, S-ro Paulo Amorim Cardoso donacis 100 ekzemplerojn de sia verko "ESPERANTO LÍNGUA VIVA", je la valoro de Cr$ 1.000.000,00.

BEL-estraro laŭdas tiun taŭgan kaj grandiozan iniciaton kaj ankaŭ donacas ion. Ĉar la tre kapabla Loka Kongresa Komitato jam sendis al BEL la finan dokumentaron de la kongreso de Anápolis, la estraro decidis donacis sian tutan parton de la financa rezulto, je la valoro de Cr$ 1.068.000,00.



# ROK-BANDO DEBUTAS

Ni parolas pri "Torino", metala rok-bando de Brazilio. Je la vespero de la 11-a de julio, en la Placo Emanuel (Anàpolis, GO.), en spektaklo organizita de la LKK, kun apogo de la urbestrejo kaj lokaj komercistoj, "Torino" prezentiĝis kantante plurajn muzikojn, inter ili, tri kun esperantaj tekstoj laŭ tradukoj de Flàvio Fonseca.

Pere de sia eksploda ritmo, la Grupo, konsistigata de Joĉjo, Luĉjo, Ludoviko, Vilĉjo, kap-tuŝis la spektantojn, pez-metalajn amantojn. La Grupo intencas daŭrigi sian muzik-laboron en la esperanta medio, pligrandigante la esperantan repertuaron kaj partoprenante en esperantaj eventoj. La telefon-numero por kontakti "Torino"-n estas (061) 366-2214.

# FINANCA RAPORTO ĈE LIGO

Jam atingis BEL-n la Financa Raporto de 28-a Brazila Kongreso de Esperanto (Vd.aliloke). Jen alia bona kialo laŭdi la bonegan laboron de LKK: pretigi kaj sendi al BEL la Bilancon, en la rekorda tempo-daŭro de malpli ol 1 (unu) monato post la kongresa fermo. Gratulojn ankoraŭfoje al tiu bela trupo.

La financa rezulto, cetere kaj ne surprize, estas pozitiva kaj kies 50% reprezentis la valoron de Cr$ 1.068.000,00 destinita al BEL.

La Estraro unuanime tuj prenis la decidon donaci tiun sumon al "Fondaĵo Almada" por subteni la aĉeton de sidejo por BEL.

RESUMO DO BALANÇO DO
28º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO:
(A descrição detalhada foi enviada à Liga)

RECEITA:

| | |
|---|---|
| - Inscrições.................. | CR$ 5.258.500,00 |
| - Aplicações Financeiras.... | CR$ 3.841.008,00 |
| - Curso Cseh.............. | CR$ 720.000,00 |
| - Excursões................ | CR$ 1.730.000,00 |
| - Doações.................. | CR$ 3.925.106,00 |
| - TOTAL DA RECEITA......... | CR$15.474.614,00 |
| DESPESAS...................... | CR$13.338.614,00 |
| SALDO POSITIVO................ | CR$ 2.136.000,00 |

(o saldo foi dividido entre o "Anápolis" E-Klubo e a Liga Brasileira de Esperanto, cabendo a cada entidade a quantia de CR$ 1.068.000,00).

# KATOLIKOJ KAJ SPIRITISTOJ

Preĝis por la estonteco de nia idealo.
Nia ununura Dio,
la "potenca senkorpa mistero" de Zamenhof,
aŭdinte la saman alvokon
el du diversaj flankoj, sendube
ĵetos ameman rigardon al ni!

# DUMKONGRESAJ EKZAMENOJ BEL/ILEI

De kvin jaroj BEL organizas, kadre de la Brazilaj Kongresoj de Esperanto, ekzamenojn kiuj estas unika oportuno por esperantistoj scii kiel statas siajn lingvajn konojn kaj krome ricevi atestilon pri tio.

La ekzamenoj estas sub la respondeco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI, kies reprezentanto en Brazilo estas S-ino Elvira Fontes, el San-Paŭlo.

En Anápolis estis ekzamenitaj kaj ricevis la aprobon la jenaj homoj:

<u>BAZA EKZAMENO</u>:

1) Hermes Pereira Dourado, Rio Verde, GO.
2) Janete das Graças O.Souza, Brasilia, DF.
3) Marly de Oliveira Moysés, Barra Mansa, RJ.
4) Salvador Magalhães Brandão, Salvador, BA.
5) Tobias Ferreira, Barra Mansa, RJ.
6) Yvone Schneider, Porto Alegre, RS.

<u>MEZGRADA EKZAMENO</u>:

1) Adelson Andrade A. Sobrinho, Fortaleza, CE.
2) André Rezende Cassundé, Vila Velha, ES.
3) Elisia Martins de Oliveira, Salvador, BA.
4) Marcelo de Castro Sant'Ana, Aracruz, ES.
5) Silvia Buhler, Resende, RJ.

<u>SUPERA EKZAMENO</u>:

1) Marcelo de Castro Sant'Ana, Aracruz, ES.

<u>INSTRUISTA EKZAMENO</u>:

1) Alberto Flores, Volta Redonda, RJ.
2) Ari Santos Assunção, Belo Horizonte, MG.
3) Manoel Maria Mizael, Vila Velha, ES.
4) Neusa Priscotin Mendes, Ribeirão Preto, SP.

# KIAL NE FAKAJ KUNSIDOJ ?

Ĉeestis la 28an Kongreson en Anápolis la kuracistoj Izao Carneiro Soares, Raul Conde, Carlos Lima Melo, Aymoré Vaz Pinto, Sidney Assis Brasil (prezidanto de LKK), krom odontologo Roberto Rezende kaj aliaj pri kies nomoj ni ne estas informitaj.

Konsultinte la aliĝilaron de BEL, oni konstatis ke en la sama fako estas 35 specialistoj. Do, eblas aranĝi fakajn kunsidojn en la estontaj kongresoj, kial ne?

La interesatoj bonvulu kontakti D-ron Aymoré, BEL-Estrarano.

# STATISTIKO DE LA 28-a BKE

| Stato | Aligoj | Partoprenoj | Neceestoj % |
|---|---|---|---|
| RJ | 76 | 51 | 33 |
| GO | 75 | 71 | 5 |
| SP | 56 | 37 | 34 |
| DF | 30 | 27 | 10 |
| MG | 24 | 19 | 21 |
| ES | 14 | 13 | 7 |
| BA | 13 | 12 | 8 |
| PR | 13 | 13 | 0 |
| CE | 7 | 3 | 57 |
| RN | 7 | 5 | 28 |
| MS | 5 | 4 | 20 |
| PB | 5 | 0 | 100 |
| PE | 5 | 5 | 0 |
| RS | 5 | 1 | 80 |
| AL | 3 | 2 | 33 |
| MT | 2 | 2 | 0 |
| RR | 2 | 1 | 50 |
| AM | 1 | 1 | 0 |
| SC | 1 | 1 | 0 |
| Ŝumo | 344 | 269 | |

# BEL kaj BEJO KUNE KONGRESOS

**Rezulte de la kunveno BEL/BEJO en la la kadro de la 28-a BKE, BEJO proponas, kun la celo ŝpari fortojn kaj monon, rekte partopreni en la organizado de la 29-a BKE. Detaloj estos diskutitaj rekte kun LKK. La interkonsento ne signifas por ĉiama kunaranĝo, kiu daŭros ĝis kiam montriĝos interesa por ambaŭ.**

# EXPERIÊNCIA QUE PASSA

Desde o 27º CBE, em Vitória, a Diretoria da Liga Brasileira de Esperanto, juntamente com as respectivas Comissões Organizadoras(CO), vem tentando definir, como parte do planejamento desses eventos, um cronograma modelo com o levantamento das principais ações e metas a serem atingidas durante o período preparatório. Neste sentido, transcrevemos a colaboração prestada pela CO/28º CBE, na pessoa de Henrique A. K. Mendonça, que se dispôs ao trabalho de relatar alguns dos pequenos problemas que ocorreram durante o evento, cuja experiência poderá ser muito útil para a Liga e os futuros organizadores:

1) Atraso na apresentação do grupo musical "Torino" em praça pública, devido ao fato de precisar na última hora recorrer a um eletricista particular, com- prando material sem prévia análise, pelo fato de haver confiado em um órgão público que prometeu fazer sem custos e emprestar o material.

2) Algumas atividades previstas inicialmente para se realizarem em português, visando alcançar o público não esperantista, terminaram por se darem em esperanto, o que ocasionou frustração naqueles que aguardavam-nas em português. Não foi bom do ponto de vista de atrair, ou pelo menos manter esse público minoritário envolvido no tema, e que ali compareceu por ser informado que ouviria uma palestra ou painel que pudesse entender.

3) A questão do preço do "komuna logejo" não foi imprevisto. Havia um contrato com o Patronato "Madre Mazzarello" desde setembro/91 que definia as condições e que poderia ter sido invocado se levado em tempo o fato ao conhecimento da pessoa apropriada. Uma medida importante seria o 29º CBE registrar o contrato em cartório, para uso em tais eventualidades.

4) Houve problema com o apresentador para um dos itens do programa, tendo em vista a desistência de última hora, alegando incompetência. A saída foi a improvisação.

5) Foi oferecida uma excelente refeição, através de restaurante contratado para o local. Contudo, o restaurante terminou quase por ter prejuizo, pois houve uma espécie de arrebanhamento de congressistas para alguns restaurantes da vizinhança, com preço menor é verdade, mas com qualidade bem inferior.

6) Seria desejável que o "Libroservo" para o 29º CBE fosse montado em estantes (mesmo estandes), principalmente em se tratando de o local ser um "campus" universitário.

7) Quanto às fotografias, lamentavelmente, o excelente Foto da cidade contatado há mais de 6 meses, não compareceu para realizar o trabalho, alegando que o funcionário escalado para o serviço foi o responsável e que por isso foi demitido. A sugestão é mais de um fotógrafo com o mesmo tipo de arte (legenda no rodapé da foto)

Henrique prometeu em breve relatar as medidas tomadas em diversas áreas para prevenir possíveis falhas.

## ORGANIZIĜO KAJ PRIORITATOJ

Okaze de la unua Estrar-kunveno oni decidis organizi la laborojn laŭ du ĉef-linioj:

a) Ĝeneralaj Kunvenoj por pritrakti temojn de ĉies intereso/respondeco kaj raporti pri la evoluo de la laboroj.

b) Sektoraj Kunvenoj kie respondeculoj pri specifaj temoj prenos decidojn kune kun la prezidanto aŭ vic-prezidanto de BEL.

Ĝenerala Kunveno okazos unu fojon monate, ordinare. La Sektoraj okazos laŭ bezone.

La Estraro, surbaze de la platformo, listigis la prioritatajn erojn por labori en la venontaj jaroj:

-- Perkoresponda kurso;
-- Komunikado kun la asocianoj
-- Informservo
-- Reto de BEL-Reprezentantoj.

# VIDEO-BENDO PRI LA 28-a BKE

Brazila Esperanto-Ligo pretigas video-bendon , kiu montras diversajn kongresajn erojn okazintajn en Anápolis, dum la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Danke al helpo de S-ro Cleto, unu el la plej novaj BEL-kunlaborantoj, kiu filmis grandparte la kongreson, ni elektis la temojn konsistigantaj la video-bendon. Do, se vi ne partoprenis la kongreson aŭ volas reĝui ĝin, tuj mendu ekzempleron de la video-bendo, kontraŭ la pago de Cr$ 100.000,00 (laŭeble petu konfirmon de la prezo).

BEL-Libroservo povas havigi al vi ankaŭ video-bendon kun la tuta prelego de Profesoro José Passini (Praktika Uzo de Esperanto), aŭ de Profesoro Geraldo Mattos (La Akademio Respondas).

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**
Caixa Postal 3625, CEP 70084, Brasília (DF) Tel: 226-1298

IMPRESSO